

LANTI

**★ la laborista
esperantismo**

Suplemento
de

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
n°81A **2,20 FF**

Antaŭrimarkigo

Interkonsente kun la eldoninta de la unua eldono, S.A.T. (ĝi aperis en la jaro 1928), La Juna Penso aperigas tiun ĉi stencilitan kajeron por la nova generacio de laboristaj esperantistoj.

Kredeble la novuloj en nia movado demandas : Kial reeldoni broŝuron el la jaro 1928, dum en la daŭro de 40 jaroj multaj cirkonstancoj en la vivmaniero ŝanĝiĝis ?

Nu, se efektive multo ŝanĝiĝis en tiu temospaco, precipe rilate la teknikan disvolviĝon kaj la sciencojn, tamen la pozicio de nia laborist-esperantista movado restas firma, precipe rilate la edukon kaj klerigan taskon, en kiu rolas S.A.T. Kaj tiun rolon precizigas ĝuste la V-a ĉapitro en tiu ĉi broŝuro, tiuj linioj, kiuj aŭguras la sennaciigon de la homaj mensoj kiel kondiĉon por socialisma mondo - rolo neglektita de la laboristaj partioj kaj sindikatoj.

Kaj neniu certe estis pli kompetenta por prognozi pri la estonta evoluo homara kaj la tasko de la monda laboristaro, ol la patro de S.A.T., K-do E. Lanti.

En la intereso de la pliprofundigo de niaj ideoj kaj de la disvastigo de nia idealo ni bonvenigas la reeldonon ĉi tie prezentatan. N. Bartelmes.

Antaŭparolo

Laŭ plej freŝdata statistiko, ekzistas nuntempe en la mondo 126.000 esperantistoj. El tiu nombro pli ol la duono certe estas ĉu simplaj laboristoj, ĉu batalantoj por la emancipo de la laborista klaso. Ekzistas do jam sufiĉe larĝa kampo por diskonigi la celon kaj taskojn de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Temas konvinki la neorganizitajn esperantistojn laboristajn pri la neceso aliĝi al nia movado; temas ankaŭ liveri al la nunaj anoj direktojn por ilia agado. Estas ja konstatebla fakto, ke multaj SAT-anoj ne komprenas ĝuste la signifon kaj karakteron de nia organizo. Kvazaŭa programo estas do necesa por helpi al ili en ilia orientiĝo por propagandi kaj apliki esperanton.

° °

Ni titolis ĉi tiun verketon : La Laborista Esperantismo, por diferencigi nian movadon de la t.n. neŭtrala, kiu sin bazas sur la simpla esperantismo, difinita jene ĉe la I-a Universala Kongreso de Esperanto :

"La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu 'ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn', donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperant-

isto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas".

Leginte la ĉi supran citon, ĉiu klaskonscia laboristo bone komprenos, ke li ne povas konsenti kun tia mallarĝa difino pri esperantismo. Ni ne havas la naivecon kredi, ke esperanto povos resti eterne nur helpa interkomprenilo kaj ne elpuŝos la naciajn lingvojn. Nia esperantismo jam nun tiras ĉiujn konsekvencojn el la estonta fakto de komuna lingvo tutmonde uzata. Aliparte esperanto ne estas por ni "neŭtrale homa", sed ilo por faciligi nian batalon kontraŭ la kapitalisma ekspluatado.

o°o

La verketo : For la Neŭtralismon! faris negativan laboron, en tiu senco, ke ĝi celis nur montri la neceson por la esperantistaj laboristoj aparte organiziĝi. Tiu broŝuro jam havis tri eldonojn, kio montras, ke ĝi trovis bonan akcepton ĉe nia popolo.

Ĉi tiu dua verketo celas fari pozitivan, konstruan laboron. Ni esperas, ke ĝi ne havos malpli da sukceso ol la unua.

E.L.

18. Julio 1928.

I

Civilizeco kaj Artefariteco

Kio karakterizas plej bone la evoluadon de la Homaro, tio estas ĝia tendenco eliri el mistika stato kaj celadi al racieco. En la plej primitivaj epokoj, la elpensemo de l'homo igis lin artefari ilojn por ĉasi kaj sin defendi. La fabrikado de plej simpla objekto postulas la obeon al fizikaj leĝoj. Tial racieco povis iom post iom enpenetri la homan cerbon. La konstruado de domoj, de ŝipoj, la fabrikado de iloj kaj finfine de treege perfektaj kaj delikataj aŭ potencaj maŝinoj okazis samtempe kaj paralele kun la kreskado de la racio en la homa menso.

En la bonstato de l'homo, ĉiu progreso estas ligita intime kun artefariteco. Artefaritaj estas niaj manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Plej bonaj fruktoj kreskas ĉe kulturitaj arboj, kaj oni povas eĉ diri, ke ili ankaŭ estas iel artefaritaj; ili almenaŭ estas arte kreskigitaj. La homo fariĝis la "reĝo de l'naturro" dank'al sia kapablo arte aliigi la medion, en kiu li vivas. La besto sin adaptas al la medio; la homo adaptas la medion al si.

La civilizo estas rezulto de raciigado. Sed tio okazis ĝis nun preskaŭ senkonscie, plej ofte senmetode kaj nur laŭ limigita skalo. Ni eniras periodon (1), en kiu ekzistas tendenco, konscie, metode kaj

(1) Ĉiu historia periodo havas siajn proprajn leĝojn ... sed tuj kiam la vivo transpasis la periodon de donita evoluo, kiam ĝi eliris el donita stadio kaj transiris en alian, tiam ĝi estas regata de aliaj leĝoj.

K. Marks.

(Laŭ cito de N. Buĥarin en "La teorio de l'historia materialismo", pĝ. 68 de la franclingva eldono.)

grandskale (2) ĉion raciigi. La ennaskita elpensemo de l'homo estas sendube ia vivilo. Hodiaŭ la scienco, la tekniko - rezulto de la malvolviĝanta racio en la homa cerbo - fariĝas kvazaŭ socia, kolektiva vivilo.

La fervojoj kaj vaporŝipoj, la aviado kaj senfadena telegraf- kaj telefonio malgrandigas la distancojn tigrade, ke homoj el diversaj kontinentoj baldaŭ sentos sin kvazaŭ ili estus najbaroj. Ekzistas nehaltigebla tendenco al normigo, tipigo en la produktado. La mondo unueciĝas, dank'al senĉese malvolviĝanta tekniko. La Racio, la Artefariteco triumfas.

°°

Estas tamen kampo, sur kiu ĝis nun la racio malmulte enplantiĝis. Ni aludas pri la multlingveco, ekzistanta en la mondo, kiu metas barojn inter la homoj el diversaj mondpartoj. Lokomotivoj kurantaj sur reloj en Eŭropo, en Ameriko, en Azio, en Afriko estas proksimume la samaj kaj povas esti kondukataj de ĉiu ajn maŝinisto. Aŭtomobilo aŭ aeroplano fabrikita ĉu en Parizo, ĉu en Tokio, ĉu en Novjorko, ĉu en Moskvo aŭ en alia urbo povas tuj esti kondukata de fakulo. La samon oni povas diri pri ĉio, kion produktas grandskale la moderna tekniko.

Sed en kelkaj partoj de l'mondo, homoj vojaĝantaj per rapidaj veturiloj baldaŭ renkontas aliajn homojn, kun kiuj ili ne povas interkompreniĝi, tial ke ili parolas malsaman lingvon. Ili uzas samajn ilojn, sed tiujn ilojn ili nomas per malsamaj vortoj. Sur la lingva kampo regas ankoraŭ la mistika primitiva stato. Ĉi tie ankaŭ necesas raciigadi.

Antaŭ kelkdekoj da jaroj, eĉ lingvistoj opiniis, ke lingvo estas kvazaŭ viva organismo; ke sekve estas

(2) Raciigado en kapitalisma soci-ordo tendencas nature okazi ĉefe por la profito de la ekspluatanta klaso. La ekspluatitaro devas batali ne kontraŭ la raciigado mem, sed kontraŭ la maniero laŭ kiu la burĝaro tendencas raciigi. Vera raciigado cetere devas celi la bonstaton de la tuta homa speco.

tute ĥimera la provo starigi racie artefaritan lingvon. Same plej famaj kaj kleraj homoj neis siatempe la eblecon veturi per vapormaŝinoj. Aliaj mokis la "fantaziulojn", kiuj provis imiti la birdojn kaj flugi per artefaritaj aparatoj...

Hodiaŭ la lingvo-scienca instruas, ke lingvo estas socia institucio tradicia; ke la homa volo senĉese influas en lingvaj aferoj. Plej aŭtoritata lingvisto skribis antaŭ nelonge: "La ebleco starigi artefaritan lingvon, facile lerneblan kaj la fakto, ke tiu lingvo estas utiligebla, estas pruvitaj per la praktiko. Vana estas ĉia teoria diskutado: esperanto funkcias (1)". Kaj en la sama libro la aŭtoro konkludis: "Nur artefarita lingvo povas doni al la internaciaj rilatoj la praktikan kaj simplan ilon, kiu mankas por ili".

Racieco komencas penetri ankaŭ sur la lingvan kampoj...

II

Viva artefarita lingvo.

La bezono de tutmonda interkomprenilo jam delonge ekzistas. Pro tio troviĝis homoj, kiuj provis arte kontentigi tiun bezonon. Estis faritaj multaj provoj por starigo de artefarita lingvo. Pensemaj homoj jam delonge rimarkis, ke la t.n. naturaj lingvoj entenas multe da komuna, precipe radika materialo; ili konstatis, ke en tiuj lingvoj svarmas la esceptoj, la kontraŭdiroj kaj diversaj absurdaĵoj. Ili penadis por krei racian lingvon, en kiu regus ordo, simpleco, reguleco.

Sed racieco kaj artefariteco devas ĉiam sin apogi sur konkretoj; aliel la elpensemo similas nur fantazion. Multaj projektoj de artefaritaj lingvoj tute fiaskis, tial ke ilia bazo ne radikis en la vivo. La

(1) "Les langues dans l'Europe Nouvelle" (1918) (La Lingvoj en la Nova Eŭropo), de A. Meillet, profesoro ĉe la Pariza Universitato, direktoro de studoj ĉe la lernejo de Altaj Studoj.

tuta konstruo ŝvebis en aero, konsistis el abstraktoj kaj ne trovis apogilon en la instinkto, en la sento de l'homo.

Antaŭ kvardek jaroj troviĝis genia homo, kiu bone ekkonis la leĝojn pri la vivo de la lingvoj kaj submetis sian elpensemon al tiuj leĝoj. Lia racio ne perfortis la instinkton, sed nur ĝin gvidis. Lia natura lingvo-sento kondukis lin al ĝusta solvo de l'problemo. D-ro L.L. Zamenhof iniciatis lingvon, kies elementoj jam troviĝas en la vivantaj lingvoj. Per multjara praktikado de sia lingvo, li sukcesis doni al ĝi vivon kaj animon. Tial esperanto - tiel estas nomata la lingvo - trovis ĉe interesigantoj bonan akcepton kaj venkis ĉiujn konkurencajn projektojn, antaŭ kaj post ĝi aperintajn. La aŭtoro de esperanto sukcese alkondukis raciecon sur la lingvan kampon. Artefariteco tie ĉi ankaŭ plene venkis.

°°

Sed la lingva problemo evoluas en tute specialaj kondiĉoj, laŭ tute apartaj cirkonstancoj. Plej bona elpensado devas eliri el la eksperimentejo kaj eniri la praktikan aplikadon por esti utila. Kaj la aplikado de lingvo postulas ĝeneralan akcepton flanke de la publiko. Por tion atingi stariĝis propagandaj asocioj. Da ili jam nun ekzistas en ĉiuj partoj de l'mondo. Kaj sen ia troigo oni povas diri, ke la de Zamenhof artefarita lingvo eniris ĉiujn fakojn de la socia vivo : komercistoj utiligas esperanton por siaj negocoj; scienculoj por siaj traktatoj; policistoj por siaj serĉadoj; pastroj por disvastigi siajn absurdaĵojn; literaturistoj eldiras en esperanto siajn pensojn, kaj poetoj elkantas sian animstaton per versoj; oratoroj vekas aplaŭdadon kaj geamantoj trovas en la lingvo plej mildajn esprimojn. Esperanto estas jam ĉiurilate elprovita kaj preta por ĝenerala enkonduko. La artefarita lingvo fariĝis viva lingvo.

°°

III

Esperanto je la servo de l'Proletaro.

Estas bone spertita fakto, ke la Laboristaro povas atingi plibonigon de siaj labor-kaj vivkondiĉoj per konstanta batalado kontraŭ la ekspluatanta klaso - la burĝaro. Tia batalo por sukcesi bezonas unuiĝon. Komence la ekspluatitoj sindikate grupiĝis en la urbo, kie ili laboris; poste la grupiĝo plilarĝiĝis, fariĝis regiona, nacia, internacia.

La kapitalismo, enirinta la stadion de imperialismo, disvolvas la produktofortojn tiagrade, ke la ekonomio pli kaj pli interplektiĝas laŭ tutmonda skalo. Grandaj trustoj jam nun posedas fabrikojn en plej diversaj partoj de l'mondo. Se la laborforto estas malpli kara en iu loko, t.e. se la tieaj laboristoj estas malpli postulemaj kaj ne bone organizitaj, la industriĉefoj tendencas pligrandigi la produktadon en tiu loko, kaj tiel senlaboriĝas la alilokaj laboristoj.

En tre proksima tempo la strikoj en kelkaj industrioj povos esti sukcesaj, nur se ili okazos samtempe kaj tutmonde. La granda plimulto da laboristoj ne ankoraŭ komprenas tion. Sed la faktoj pli kaj pli devigos ilin kompreni. Jam gvidantoj devis konfesi, ke la lasta karbminista striko en Britio malsukcesis ĉefe pro tio, ke en Germanio, en Francio kaj en aliaj landoj ministoj elfosis la bezonatan karbon, kiun aĉetis Britiaj industriĉefoj. Rezultas el tia stato, ke la laboristoj nepre bezonas ne nur internacian, sed eĉ tutmondan unuiĝon.

Por unuiĝi necesas interkompreniĝi. Kaj jen aperas la bezono de komuna lingvo.

o°o

La reganta klaso ĝis nun solvis la problemon relative facile. La idoj de la burĝaro ja vizitas la lernejon ĝis sia 20-25-30-a jaraĝo. Tie ili lernas kelkajn lingvojn, kaj tiel diversnaciaj burĝoj povas pli malpli bone interkompreniĝi. Aliparte la grandaj firmoj

kaj entreprenoj povas salajradi tradukistojn kaj interpretistojn. Tia solvo de la interkompreniĝo ne estas racia, sed ĝi almenaŭ ebligas la komercajn rilatojn.

Tute alia estas la situacio ĉe la laborista klaso. La proletaj gefiloj forlasas frue la lernejon kaj apenaŭ povas korekte uzi sian gepatran lingvon. En tiaj kondiĉoj la tutmonda nepre necesa unuiĝo de la laboristoj estas malfacila. En la ĝisnunaj provoj de unuiĝo inter la naciaj organizoj laboristaj oni devis imiti la burĝojn kaj uzi la helpon de tradukistoj kaj interpretistoj. Intima kunlaborado, intima konatiĝo inter la diverslingvaj ekspluatatoj estas tute neebla. La gvidantoj de laboristaj organizoj traktas pri la interesoj de siaj delegintoj kvazaŭ negocistoj rilate varojn. Milionoj da laboristoj, kies klasaj interesoj estas la samaj, restas ja apartigitaj, enkadritaj per la lingvaj baroj kaj staras mute unuj apud aliaj kvazaŭ objektoj, varoj.

Kvankam la rilatoj inter la diverslandaj organizoj estas ankoraŭ neoftaj, preskaŭ okazaj, ili tamen jam postulas la elspezon de grandaj sumoj por la tradukado de dokumentoj, de raportoj, de tezoj en multajn lingvojn, por la eldonado de samenhavaj revuoj en kelkaj lingvoj. La intereso de la laborista klaso urĝe postulas la forigon de la lingvaj baroj. La gvidantoj de la laborista movado, kiuj malatentas tiun problemon, iel perfidas la laboristojn. Ne sufiĉas prediki elokvente la neceson de tutmonda unuiĝo, se oni malzorgas la rimedojn, kiuj ebligas tiun unuiĝon. La mondlingva problemo estas jam teorie solvita. Laŭ malgranda skalo, esperanto eĉ eniris la praktikon, la socian vivon. Tamen la grandega plimulto da laboristaj gvidantoj faras nenion por apliki la solvon.

Tia stato postulis la starigon de organizo, kies ĉefa celo estas la praktika aplikado de esperanto por la interesoj de l'Proletaro.

IV

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)a) Ĝia celo

Kiam temis pruvi per faktoj, ke artefarita lingvo povas bone funkcii; kiam ekzistis en la mondo tre malmulte da esperantistoj, tiam estis necesa ilia kuniĝo en sama asocio. Burĝoj kaj proletoj, katolikoj kaj framasonoj, anarkistoj kaj policistoj, unuvorte, ĉiuj esperantistoj el plej diversaj medioj kaj devenoj havis intereson kunlabori por montri al la publiko, ke la lingvo iniciatita de Zamenhof kontentige solvas la problemon pri tutmonda interkompreniĝo. Politika neŭtraleco tiutempe estis necesa.

Sed pasis dekoj da jaroj. Esperanto disvastiĝis en ĉiuj medioj de la socia vivo. Tiam alvenis la tempo, kiam necesis fakiĝi la propagandon kaj aplikadon de la lingvo. Kiam la ilo estis ĉiufake elprovita, evidentiĝis, ke ĝi povas utili por plej diversaj celoj. La laboristoj sekve perfidus la interesojn de sia klaso, se ili daŭrigus elspezi sian monon, sian energion, por enkonduki esperanton en la tendaro de siaj klaskontraŭuloj. Troviĝis homoj por krei: "For la neŭtralismon!... Ni metu esperanton je la servo de niaj klasaj interesoj!"

En 1921, okaze de la XIII-a Universala Esperanto-Kongreso, laboristoj kunvenis aparte kaj fondis la organizon nomitan Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĝi do jam ekzistas de post ok jaroj, kaj ĝia celo estas jene klarigita en la Statuto:

1. Sub la nomo Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) estas fondita Asocio, kiu celas: a) utiligi praktike la internacian lingvon esperanto por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda; b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidareco; c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj;

ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj kies celo estas analoga al tiu de SAT; d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

°°

SAT, ne estante politika sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas, per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn, kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo (1)

b) Ĝia strukturo kaj organizeco

Kiel jam dirite, SAT ne havas politikajn taskojn. Ĝi celas precipe ebligi al siaj membroj la praktikadon de esperanto laŭ tutmonda skalo. Homoj, kiuj forrenversis inter si la lingvajn barojn, povas tute bone jam nun ignori la naciojn en sia organiziĝo. Je eduka vidpunkto estas en tio certa utilo: la anoj de la organizo kutimiĝas spirite sin konsideri kiel

(1) La du ĉi supraj alineoj estis aprobataj ĉe la VIII-a Kongreso kaj estas submetotaj al ĝenerala voĉdonado. Oni tamen povas konjekti, ke ili estos definitive akceptataj. - 14-IX-28.

apartenantaj al iu unu, ampleksanta la tutan mondon. Tia kondiĉo estas necesa, por ke ili akiru pli kaj pli la emon uzadi inter si la lingvon, pli kaj pli ofte interrilatiĝi kaj intime kunlabori.

Eĉ asocio, kiu ignoras la naciajn limojn, bezonas tamen gvidantaron. Por ke la gvidantoj ne povu nacie influi la gvidadon, necesas, ke ili neniel reprezentu la interesojn de iu aparta lando aŭ ŝtato. Tial la iniciatintoj de SAT decidis arbitre disdividi la mondon laŭ sektoroj. La strukturo de SAT bazas sur konsilantaro el 24 anoj, po unu por ĉiu sektoro limigita per du meridianoj. La konsilantoj estas elektataj de la asocioj per ĝenerala voĉdonado. Ĉiuj ŝanĝoj en la Statuto povas okazi ankaŭ nur per tia ĝenerala balotado.

Ĉiujare la SAT-anoj ricevas kun sia Jarlibro voĉdonilon, per kiu ili havas eblecon influi la funkciadon de la tuta Asocio. Tia sistemo estas plej demokrata kaj montriĝas tute taŭga en la praktiko.

°°

Sekcioj. - SAT estus peza, burokrata organismo, se ĝia Centro devus plenumi ĉiujn taskojn. La "kapo" devas havi kiel taskon nur interrilatigi, interligi la diversajn organojn. Tiel cetere okazas en viva estulo : la koro, la pulmoj, la renoj, la okuloj k.a. organoj havas ĉiu sian apartan funkcion. Kaj la cerbo estas la regulilo inter la diversaj organoj.

Simile estas en SAT : jam ekzistas Pedagogia, Koo-
perativa, Junulara, Studenta, Sporta, Vegetara Sek-
cioj. Aliaj certe stariĝos kun la malvolviĝo de la Asocio. Liberpensuloj, literaturistoj, sportistoj, radiuloj, blinduloj kaj ceteruloj ankaŭ iun tagon sentos la bezonon starigi kaj funkciigi sekcion en la kadro de SAT. (°)

(°) Noto de la reeld., 1974 : Aktuale, ekzistas nur junulara sekcio (t.n. SAT-Junulfako). La liberpensuloj ariĝas en frakcio, ankaŭ la abundanoj, liberec-anoj, mondĉivitanoj, pacistoj, sennaciistoj, ktp.

La Estraro estas ĉiam preta doni moralan apogon kaj kuraĝigon al Kamaradoj, kiuj volas fake labori en iu speciala medio. Necesas tamen, ke la iniciatantoj taksu ĝuste siajn fortojn kaj ne starigu entreprenon nevivkapablan. SAT estu granda, libera laborejo, kie ĉiu penadas en sia fako por la komuna intereso de l'tutmonda Proletaro.

c) Ĝia superpartieco

La laborista movado estas neunuece organizita. Ekzistas diversaj partioj, sindikatoj, kooperativoj, sportasocioj aŭ aliaj similaj organizoj. Ĉiu el ili celas altiri al si la tutan laboristaron. Tiucele okazas polemikoj, disputoj, eĉ kelkfoje bataloj inter tiuj konkurencaj tendencoj. SAT ne enmiksiĝas en tiuj disputoj. Ĉiuj disputantoj same bezonas esperanton. Cetere okazas ne malofte, ke iuj transiras de unu tendenco en alian, de iu partio en alian.

Nur la sperto povas pravigi aŭ ne teorion, taktikon. Estas nur eble ekscii, firme konvinkiĝi pri la celo, al kiu sin direktas la tuta organizita Laboristaro. Tiu direkto estas sufiĉe larĝvoja, kaj inter la limoj de tiu vojo SAT lasas al siaj anoj plenan liberecon. Neniu ano estas devigata malkonfesi la principojn, kiuj konsistigas la programon de lia partio. Nenio en SAT kontraŭstaras al iu ajn laborista organizo. En la presorganoj de SAT ĉiuj tendencoj havas la rajton defendi, klarigi sian propran teorion vidpunkton sub decia formo. Ĉiu rajtas diskuti; nur disputado estas malpermesata.

La ĉefa tasko, kiun difinis al si la organizita Laboristaro, estas la forrenverso de l'nuna kapitalisma soci-ordo, - kiu okazigas militojn, senlaborecon, mizeron kaj eĉ minacas pereigi la tutan civilizon per venontaj kruelaj kaj absurdaj militoj. La limoj de la vojo surpaŝata estas la konfeso pri ekzisto de klasoj kaj neceso por la Laboristaro batali kontraŭ la ekspluatanta klaso. La laboristoj, kiuj ne konsentas pri tiu neceso, perfidas sian klason kaj sekve ne povas trovi lokon en nia Asocio.

SAT estas superpartia. Ĝia aparato ebligas al anarkistoj, al komunistoj, al sindikatistoj, al socialistoj interrilatiĝi, interkonatiĝi mondscale kaj ricevi informojn, kiujn ili povas utiligi polemike ekster SAT kontraŭ malsampartianoj, malsamten-dencanoj.

Se Kamarado akiras per konstanta uzado de esperanto pli da klareco; se per la SAT-aparato li povas bone informiĝi pri ĉio, kio interesas la tutmondan laboristan movadon, ne povas esti dubo, ke li far-iĝos pro tio plej taŭga partiano, plej bona sindikat-ano kaj plej valora batalanto por la interesoj de sia klaso. Tial, kvankam estante superpartia organi-zo, SAT tamen tre povas utili al ĉiu partio, al ĉiu tendenco. Superpartieco ja ne signifas kontraŭparti-econ.

o°o

Frakcioj. - Kio estas frakcio ? Se oni malfermas vortaron, oni legas : Frakcio estas parto de unuo. Se oni konsentas pri tiu difino, evidentiĝas, ke SAT konsistas el frakcio da anarkistoj, frakcio da komun-istoj, frakcio da socialistoj, frakcio da sindikatis-toj ktp. Kaj tiuj frakcioj konsistigas la unuon SAT.

Dezirinde aŭ ne, aktive aŭ latente, frakcioj ekzis-tas en nia Asocio, ĉar ĝi konsistas el diverspartiaj elementoj. Ĉu estas dezirinde, ke tiuj frakcioj havu aktivan vivon ? Jes, certe.

Ĉiuj laboristaj esperantistoj havas intereson kun-iĝi en sama organizo; la apartiĝo devas esti nur laŭ-klasa, ne laŭtendenca. La tendencoj ja ne konsistigas ion firman, daŭran, kiel estas klaso. Oni povus citi multe da ekzemploj pri Kamaradoj, kiuj aliĝis sinsek-ve al diversaj partioj kaj tendencoj. Aliparte, oni povis nemalofte konstati en la historio de l'laboris-ta movado la stariĝon de novaj partioj kaj forlason de aliaj; okazis ankaŭ kunfandiĝoj. Senĉese kreiĝas novaj tendencoj, novaj fluoj, novaj organizoj politi-kaj. Kaj ni havas kiel ĉelon trudi al ili ĉiuj senes-cepte la uzadon de esperanto. Tion ni neniam forgesu.

Sed estas evidente, ke la Kamaradoj, kiuj apartenas al tiuj diversaj tendencoj, devas havi la eblecon uzi la SAT-aparaton por la intereso de sia propra tendenco. Por tio necesas, ke ili konu unu la alian, ke ili interrilatu por plenumi difinitan taskon.

Ekzemple, ĉiu konsentas, ke klopodoj ĉe partiaj instancoj havas pli da ŝanco esti bonvenataj, se ilin faras partianoj. Tial por prepari tiujn klopodojn, SAT per siaj gazetoj aŭ aliaj organoj ebligas al sampartianoj la funkciadon de frakcioj.

Oni tamen devas bone diferencigi inter sekcio kaj frakcio. La unua funkcias en la kadro de SAT kaj sub ĝia kontrolo, dum la dua funkcias ekster la Asocio, kiu havas nenian respondecon pri ĝia laboro.

Sekcioj povas eldoni gazetojn, aŭ havi specialajn paĝojn en la presorganoj de SAT, sed ne frakcioj. (°) La frakcianoj apartenantaj al la Amsterdama, Berlina aŭ Moskva Internacioj devas klopodi por atingi, ke tiuj organizoj eldonu mem revuojn aŭ dokumentojn en esperanto. Sed estus granda maltrafo, se iu frakcio el SAT-anoj volus mem eldoni gazeton. Partia gazeto devas ja aperi sub la kontrolo de la koncerna partio. Kaj sekve ĝi devas preni sur sin ties eldonon.

Frakcio ne devas havi kiel taskon "anarkistigi", "komunistigi", aŭ "socialistigi" nian Asocion. Tio estus granda sensencaĵo. Ili nur celu "esperantigi" sian propran partion, kaj por tio uzu la SAT-aparaton, kies celo estas meti esperanton je la servo de la tutmonda Proletaro kaj ne al la servo de nur iu sola partio.

d) Ĝiaj taskoj

Interhelpe. - Okazas nemalofte, ke laboristoj devas forlasi la hejmlandon, ĉu por serĉi laboron, ĉu por eviti persekutojn flanke de reaciaj aŭ faŝistaj

(°) Noto de la reeld., 1974 : Intertempe estis akceptita "Regularo pri la funkciado de la SAT-frakcioj", kiu efektive rajtigas ĉiujn frakciojn aperigi rubrikon en la organo de SAT.

registaroj. SAT difinis al si kiel taskon helpi al tiuj laborserĉantoj aŭ persekutatoj. Per eldono de Jarlibro, enhavanta la adreson de ĉiuj membroj, SAT metas en la manoj de forkuranto, de vojaĝanto, ilon per kiu li ne sentas sin izolite en iu ajn lando. En ĉiu urbo li trovas adresojn de Kamaradoj, kiuj pretas helpi al li por trovi okupon aŭ eviti malbonan okazeblaĵon. Kaj en ĉiu kunveno de la esperanta grupo, li havas la senton kvazaŭ li troviĝus meze de siaj gepatraj samlingvanoj. La interhelpa laboro de SAT estas jam nun tre atentinda kaj multsignifa.

Aliflanke, la posedo de Adresaro per kiu estas eble trovi ĉie helpemajn Kamaradojn instigas multajn junulojn travojaĝi la mondon. Tio akcelas la alproksimiĝon de la laboristoj kaj kreas fortajn solidarecajn ligilojn super la landlimoj.

°°

Informado. - SAT funkciigas Informservon, kiu liveras interesajn sciigojn pri la laborista vivo kaj konigas diversajn faktojn, kiujn kutime ne atentis la agentejoj kapitalistaj. Tiel multaj neriĉaj gazetoj povas ricevi senpage originalajn informojn.

En sia Jarlibro SAT publikigas la adresojn de la laboristaj organizoj, kiuj uzas esperanton en sia korespondado, kaj tiel ĝi plifaciligas kaj simpligas la rilatojn inter tiuj organizoj. SAT-anoj estas ĉiam pretaj servi kiel tradukantoj kaj interpretantoj per esperanto. Ili ankaŭ aranĝas korespondadon de fabriko al fabriko, de metiejo al metiejo, kaj tiel ebligas la komparon de laborkondiĉoj en diversaj landoj. Unuvorte ili uzas ĉiujn okazojn por pruvi per faktoj, kiom povas utili komuna lingvo uzata mondscale.

°°

Klerigo. - Estas bone konate, ke geknaboj, eĉ plenkajuloj, perdas emon al la lernado, tial ke, tuj ĉe la komenco de lernobjektoj ili renkontas malfacilojn. Bona metodo de instruado procedas de facilo al malfacilo. Esperanto estante facillernebla lingvo, ĉefe ĉe

la komenco, donas emon por lernado. La esperanta lernanto akiras konfidon al si mem, konstatante, ke li povis relative facile akiri sufiĉan scion de lingvo, kiu ebligas al li interrilatiĝi kun la tuta mondo. Tiel la lernemo enplantiĝas ĉe la esperantis-to. Tia emo al lernado devas trovi kontentigon. Tial SAT prenis sur sin la taskon liveri lernilojn, instruilojn, librojn ktp. en esperanto.

Por perfektigi en la elparolado, la SAT-rondoj organizas lekciojn, debatojn kaj diversajn diskutojn, kiujn partoprenas la anoj. Per tio ilia klerigemo pligrandiĝas kaj ili fariĝas pli kaj pli taŭgaj elementoj por defendi la interesojn de sia klaso kaj labori al la konstruado de nova soci-ordo.

Plej eminentaj scienculoj kiel H. Puenkare (france : Poincaré; oni ne samigu lin kun la ŝtatisto R. Poincaré) kaj A. Ejnŝtejn (germane : Einstein) pruvis la relativecon en scienco. Eĉ geometriaj aksiomoj devas esti konsiderataj nur kiel oportunoj.

Oni ja daŭrigas instrui en ĉiuj lernejoj la tri-dimensian, "Eŭklidan" geometrion, kvankam estas pruvite, ke ĝi eĉ ne plu estas oportuna, kiam temas pri grandegaj distancoj. Tial, ekzemple, Ejnŝtejn uzas por siaj kalkuloj la kvar-dimensian geometrion de Riman (germane : Riemann).

Ĉio en la mondo estas relativa. Ne ekzistas absoluta vero. Kaj tio ĝustas, "oportunas" precipe en sociologio. Tial tasko de SAT devas esti klerigi siajn membrojn en kontraŭdogma, kontraŭabsolutisma spirito. Per tia klerigado oni evitas ke sin nomantaj liberpensantaj homoj konduku kiel dogmanoj, kiel maltoleremaj sektanoj.

°°

Eduko. - Homo povas esti tre klera, sed malgraŭ tio seneduka. La klerigado rilatas nur al la cerbo; la edukado rilatas ankaŭ al la cerbo, sed plie al la koro kaj al la volo. Socio el tre kleraj kaj sciencoriĉaj homoj povas tamen esti barbara. Belan ekzemplon pri tio liveras al ni la kapitalista soci-ordo, kie

homoj malsatas, dum aliaj malsaniĝas pro troa abundeco de ĝuaĵoj. Tamen la kapitalismo malvolvis la sciencojn kaj teknikojn jam nun ĝis tre alta ŝtupo.

Eduko ne estas samsignifa kiel agitado. Politikaj partioj plej ofte nur agitadas, kiam ili parolas pri edukado. Trafa edukado celas kreskigi ĉe la homo ne nur ĝentilecon kaj afablecon, sed precipe lojalecon, sincerecon kaj sindonemon por la komuna afero. Neniu movado povas prosperi, neniu klaso povas venki, se ĝi ne entenas anojn, kiuj ĉiam estas pretaj oferi sian bonstaton, sian personan profiton - sian vivon por la ĝenerala intereso.

Sendube la ekonomiaj kondiĉoj ludas la plej grandan rolon en la rilatoj inter la homoj. Eduksistemo, kiu malatentus tiun fakton, estus nur simpla senvalora metafiziko. Sed estas bone spertita fakto, facile pruvebla vero, ke neniu homa grupiĝo povas bone prosperi sen obeo al moralaj principoj. Plej perfekta maŝino bezonas oleumadon por funkcii. Homo malsaniĝas, se li ignoras higienajn leĝojn. Simile ia ajn socio ne povas ĝui pacon kaj bonstaton, se ĝiaj membroj ne estas morale edukataj.

SAT edukas siajn anojn en tiu senco, ke ili fariĝu sociemaj, helpemaj, toleremaj inter si, lojalaj kaj sindonemaj al sia klaso. Ni volas, ke la SAT-anoj estu fortvolaj, firmkarakteraj kaj persistaj homoj.

o°

Kulturo. - Oni povas esti klera, boneduka kaj tamen ne kultura. Ne ĉiu erudiciulo estas scienculo. Scii entenas la ideon antaŭvidi. Amasego da konoj povas esti tute senutilaj, se ili ne ebligas antaŭdiri ion praktikan por la Homaro. Necesas kompreni diferencon inter klerigo, eduko kaj kulturo. Bonedukulo povas ne esti klera. Ĉiu kultura homo estas klera, sed ne ĉiu klerulo havas kulturon.

Kulturo postulas komprenon kaj senton pri plastikaj artoj, pri beletristiko, pri filozofio, pri estetiko kaj etiko. Klerulo kaj bonedukulo povas rilati al

belo kaj bono kiel blindulo al koloroj. Sed kultura homo kapablas ĝue ŝati ĉiujn elmontrojn de celado al perfekteco, ĉiujn sopirojn al idealo. Nura klereco iel pensigas pri perfekta, delikata maŝino, sed kulturo donas la ideon pri krea laboro.

SAT ne povas malatenti tiun flankon de la prihoma problemoj kaj devas celadi, ke ĝiaj membroj akiru elementojn de vera kulturo.

°°

Literaturo. - Por informi, klerigi, eduki, kulturi, SAT eldonas gazetojn, librojn kaj artaĵojn. La elekton de literaturo devas gvidi relativeca principo. Estas ja neeble ekscii tute certe, kiu el la diversaj sociologiaj kaj politikaj skoloj eldiras la veron. Eble neniu la tutan. Sociologio estas ankoraŭ tre juna scienco. SAT-anoj devas serĉi kaj elektisian propran vojon, t.e. mem decidi, al kiu partio aŭ tendenco ili aliĝos por batali kontraŭ la kapitalisma ekspluatado. Pri la ekzisto de tiu ekspluatado, laboristoj nature ne povas dubi, ĉar ĉiutage ili spertas ĝin. Dubo povas okazi nur pri la rimedoj, pri la maniero per kiuj ni povos pli facile kaj rapide emancipiĝi.

Sed kompreneble SAT-ano devas scii, ke manko de absoluta certeco ne estas sufiĉa motivo por ne agi. Por konstrui pontojn kaj maŝinojn, inĝenieroj utiligas kutime la Eŭklidan geometrion, kvankam ili bone scias pri la ekzisto de aliaj geometrioj, kies aksiomoj liverus al ili same ĝustan bazon por starigi iliajn planojn kaj fari kalkulojn. En la manoj de inĝenieroj geometrio estas ilo por konstrui; simile, partia programo estas ilo en la manoj de proletoj por sin liberigi.

SAT devas eldoni verkojn de ĉiuj aŭtoritataj teoriistoj. Anarkisto ne povas ignori la verkojn de Marks, de Kaŭtŝki, de Lenin; komunisto aŭ socialisto tiujn de Prudon, de Kropotkin, de Reklŭ. Nian Bibliotekon devas konsistigi indaj, pensigaj verkoj de ĉiuj homoj, kiuj sindone kaj sincere deziris la bonstaton de l' tuta Homaro.

Per tia eklektika procedo en la elekto de traduka literaturo, SAT treege helpas al la unuecigo de l'laborista movado. Sed multe pli grava ŝajnas al ni la eldono de verkoj originale verkitaj en la artefarita lingvo. Por ni ne ekzistas dubo, ke la uzado de racia lingvo utilas al la spirita raciigo de ties uzantoj.

Aliparte estas de ĉiuj lingvoscienculoj bone konstatita fakto, ke lingvo ludas en kia ajn socio rolon de plej ega graveco, ke la komuneco de lingvo sufiĉas por krei komunecon de kulturo kaj de sentoj. Per ĝia celado por starigi riĉan, originalan literaturon tutmondan, SAT fariĝos pli kaj pli potenca aganta forto en la historia procezo, kiu tendencas al neevitebla unuecigo de l'mondo. La tekniko alproksimigas la korpojn; la lingvo, la literaturo intimigas la korojn kaj animojn. La literatura tasko de SAT estas unu el la plej gravaj kaj meritas ĉies atenton kaj subtenon.

Antaŭ ol kreiĝos valora originala mondliteraturo, SAT havu ankaŭ kiel taskon helpi al la laboristaj organizoj, kiuj decidis eldoni per siaj propraj elspezoj literaturon en esperanto. Ĉiu sperta esperantisto bone scias, ke por verki aŭ traduki tute korekte kaj klare en nia lingvo, longa praktikado estas necesa. Estus ega danĝero por la tuta mondlingva movado, se organizoj uzus nian lingvon laŭ fuŝa maniero. Kiam tiuj organizoj decidis eldoni verkojn aŭ dokumentojn en esperanto, ili devos sin turni al SAT, kies tasko estas eduki aron da lertaj kaj kompetentaj esperantistoj.

V

Apero de nova tendenco : Sennaciismo

La Zamenhofa lingvo jam ekzistas de 40 jaroj; okazis 20 universalaj esperanto-kongresoj neŭtralaj kaj 8 universalaj kongresoj de SAT. Rilatoj inter esperantistoj el ĉiuj landoj fariĝis relative oftaj. Esperantio fariĝis kvazaŭa regno super la alia. Proletaj esperant-

istoj pro senlaboreco aŭ persekutoj de reakciaj registaroj estis dispelataj tra la mondo. Kaj ĉie ili povis konstati la ekziston de klasoj, de riĉuloj unuflanke kaj mizeruloj aliflanke; ili spertis, ke ĉie la ekspluatemo de la mastroj estas limigata nur per la klasbatalemo kaj organizkapablo de la ekspluatatoj. Fabrikestroj atentis nur pri la lerto kaj produkto-kapablo de la laboristoj, ne pri ilia naci-eco. Okazas ne malofte, ke laboristaj regnanoj en iu lando plendas pro tio, ke ili senlaboras, dum "fremdu-uloj" havas okupon. Tiel kreiĝas laborista naciismo. Tiuj proletoj ĝis nun ne komprenis, ke, ĉu rilate la aĉeton de laborforto aŭ krudaĵoj, ĉu rilate la vendon de fabrikaĵoj sur la merkato, la konkurenco jam delonge ne limiĝas je landlimoj, sed etendiĝas al la tuta mondo. Ekzemple, la stariĝo de teksindustrio en Hindio okazigis krizon en Britio kaj senlaborigis tie multajn laboristojn.

Aliflanke, post la lasta patriota mondbuĉado, multaj nacioj "liberiĝis"; ŝtatoj "sendependiĝis". Kaj la proletoj el tiuj regnoj hodiaŭ konstatas, ke ilia situacio ne pliboniĝis. Ili sekve konkludis, ke nacia liberiĝo estas por laboristoj simpla iluzio. Ĝi profitas nur al burĝoj, aŭ al tiuj kiuj okupas bone pagatajn ŝtatpostenojn. Nacie nur la komuneco de lingvo ligas la ekspluataton al la ekspluatanto. Sed proletoj esperantistoj rompintis tiun ligilon; ili almenaŭ forte konvinkiĝis, ke la lingvaj baroj estas facile renverseblaj, ĉar ili povis mem interrilati tiom facile kaj amike kun alilandanoj en la tuta mondo. Tiel kreiĝis ia konkreta stato, ia mikrokosmo (malgranda mondo), sur kiu povis naskiĝi la ideo pri sennaciismo. Troviĝis anticipemaj spiritoj por prezenti al si bildon de tutmonda socio mastrumata laŭ raciaj principoj, socio en kiu ne ekzistus landlimoj kaj estus uzata kiel kulturlingvo nur esperanto.

Sendube estis multfoje parolite en la pasinta tempo pri mondcivitaneco, pri kosmopolitismo, pri tutmonda unuigo de la laboristoj. Sed tio estis plej ofte nur temo por parolado kaj literaturo. Konkrete, praktike nenio estis entreprenata por efektiviĝi

tiujn pli malpli nebulajn pensojn. Fako estas, ke ĉiuj internaciaj kongresoj de la plej maldekstraj politikaj organizoj, ĉu politikaj, ĉu sindikataj, ĉiam sin deklaris por la "liberiĝo de subpremataj popoloj", por la sendependeco de l' nacioj ktp. Neniam la problemo pri liberiĝo de l' Proletaro estis starigata je sennacieca vidpunkto.

Kaj tio ne povis okazi, tial ke neniam la gvidantoj de la laboristaj organizoj okupiĝis pri la lingva demando. Nur la praktikado de esperanto en la kadro de Sennacieca Asocio Tutmonda povis ebligi tielan stariĝon de la problemo. Estiĝis sennacianoj, sennaciuloj, kiuj, praven malprave - ne estas ĉi tie la loko por decidi pri tio - celadas orienti la laboristan movadon laŭ sennacieca direkto. Ili argumentas, ke la laboristoj el Irlando, el Bretonio, el Nikaragvo, el Koreo, el Georgio, el Ĉinio, el Hindio aŭ el aliaj "subpremataj landoj" ne havas intereson oferi sian vivon por akiri nacian sendependecon; ili asertas, ke la sola inda kaj profitdona batalo estas la batalo kontraŭ la mastroj en la fabriko mem, en la minejo mem, en ĉiuj laborejoj mem. Ili rekomendas laŭindustrian, ne inter-nacian, sed tutmondan organiziĝon.

La sennaciuloj ne kontraŭstaras al la stariĝo de "internaciaj trustoj", sed nur rekomendas al la laboristoj okupataj de tiuj trustoj, ke ili grupiĝu super la landlimoj en sama organizo por pli efike batali kontraŭ la trusto-mastroj. Ili opinias, ke estas vana - eĉ reakcia - penado kontraŭstari al pli supera formo de organizado de l'produktado. En la pasinta tempo, kiam ribelantaj laboristoj detruis maŝinojn, ili agis reakcie kaj ne povis malebligi la senĉesan malvolviĝon de l'maŝinismo. La trusta organizado de l'produktado preparas la grundon por socialisma mastrumado. La sennaciuloj ankaŭ ne kontraŭbatalas la kapitalistan imperialismon pro jenaj du motivoj :

1) Laŭ Lenin, "la imperialismo estas la lasta stadio de l'kapitalismo"; 2) laŭ Marks, "la Socialismo povas naskiĝi nur el la kapitalisma sistemo elkresk-

inta ĝis plena matureco".

Se ĝustas tiuj asertoj de tiom eminentaj gvidantoj de l'laborista movado, estas memevidente, ke barante al la malvolviĝo de la "lasta stadio de l'kapitalismo", oni samtempe malhelpas al la stariĝo de l'Socialismo. Cetere, la popoloj, kiuj ne kapatiri profiton el la naturaj riĉaĵoj, troviĝantaj en "siaj" landoj, ne rajtas laŭ natura leĝo malhelpi aliajn utiligi tiujn riĉaĵojn.

Aliparte, estas facile konstatebla fakto, ke la disvolviĝo de la esperanta movado en ĉiuj mondpartoj nur postsekvas la enpenetron de l'kapitalismo ĉe la malfruiĝantaj popoloj. Kontraŭbatali la imperialismon signifas bari al la historia procezo, kiu tendencas nepre al starigo de mondmastrumado kaj mondlingvo. La sennaciuloj argumentas, ke ili kontraŭbatalas la kapitalismon ne pro tio, ke ĝi estas imperialisma, sed simple tial ke ĝi estas sistemo, kiu tendencas ekspluatadi la mondon por la sola profito de nur unu klaso da homoj. Per la fakto, ke homoj malkonfesas ĉian naciecon, estas memkompreneble, ke ili ne povas defendi la apartajn interesojn de iu ajn imperialisma nacio. Sed ili klare konscias, ke estas vana elspezo de energio provi haltigi la historian evoluadon. Oni ne devas celi haltigi nehaltigeblan fluon, sed nur zorgi, ke ĝia antaŭenirado faru kiel eble malplej da viktimoj (1). La sennaciuloj asertas, ke la sola inda kaj trafa batalo estas nur tiu por atingi, ke ĉiu homo, - ĉu virino, ĉu "fremdulo" - havu la samajn rajtojn kiel la viraj kaj enlandaj laboristoj.

(1) "La imperialismo estas nedisigeble ligita al la kapitalismo en ĝia nuntempa formo kaj sekve la rekta batalo kontraŭ la imperialismo estas absolute vana..." (Lenin, "La Imperialismo lasta stadio de l'kapitalismo", pĝ. 119-120 de la franca eldono). En la sama verko Lenin riproĉas al Kaŭtski, ke lia opozicio al la imperialismo estas "etburĝa, reformista, reakcia en siaj ekonomiaj bazoj..."

Kompreneble, la sennaciula tendenco ne havas en SAT pli da rajtoj nek malpli ol la aliaj tendencoj. Ni jam diris, ke nia Asocio estas superpartia; necesas insiste aldoni, ke ĝi estas plie supertendencca. Sed estus ankaŭ nelojale en ĉi tiu verketo, kies celo estas konigi la laboristan esperantan movadon, prisilenti la ekziston de tendenco, kiu kelkriate ne akordiĝas kun la nuntempa programo de la laboristaj partioj.

Oficiale, statute SAT konfesas sennaciecon en sia organizformo, sed ne sennacismon kiel socipolitikan teorion. Ĉiu devas bone noti tion en la memoron. Se la estonto montros, ke la sennacisismo malvolviĝas paralele al la malyolviĝo de l'imperialismo kaj de l'mondlingvo, oni devos konkludi el tio, ke la sennaciuloj estis pli kapablaj ol aliaj antaŭvidi la malproksiman celon, al kiu, ofte senkonscie, sin direktas la Homaro. Se tiel ne okazos, nu, la estontaj historiistoj simple parolos pri la sennaciuloj, kiel pri revuloj, utopiistoj. Dume ilia agado neniel povas ĝeni en la laborista movado, ĉar ili propagandas nur inter la esperantistoj. Ili ja opinias, ke propagandi sennacismon al malsamlingvanoj estus same malsaĝe kiel instrui beletristikon al analfabetoj.

Nur la sperto, la eksperimento povas montri la pravecon aŭ malpravecon de teorio. SAT nur ebligas starigi kaj diskonigi la pravigendan sennacismon.

VI

SAT kaj la nacilingvaj Asocioj Esperantistaj

Kvankam esperanto jam akiris tre atentindan disvastigon, estus tamen eraro opinii, ke la granda publiko estas bone kaj ĝuste informita pri la mondlingva demando. Tial informadon povas fari nur nacilingvaj aparatoj.

En la nacilingva propagando montriĝis ankaŭ necesa la laŭklasa apartiĝo de la esperantaj organizoj. Tial en kelkaj landoj starigiĝis L.E.A. (Laboristaj Esperantistaj Asocioj). Ili havas kiel taskon ne nur propa-

gandi por esperanto, sed ankaŭ organizi kursojn por lernigi la lingvon kaj eldoni lernolibrojn por ĝin instrui.

Utilas ankaŭ, ke tiuj nacilingvaj por-esperantaj aparatoj interŝanĝu spertojn pri la propagand- kaj instrumentadoj. Kaj por tion atingi internacia ligilo estas necesa. Pro tio kelkaj Kamaradoj klopodis por starigi esperantan Internacion. Ili estis influataj de la fakto, ke la laborista movado estas organizita internacie. Imitemo forgesigis ilin, ke la esperantistoj forrenversis inter si la lingvajn barojn kaj sekve neniel bezonas imiti la organizmanieron de nesamlingvanoj. La vidpunkto de tiuj internacianoj estis despli erara, ke ili ne sufiĉe atentis pri la neceso uzadi praktike la lingvon. La ekzisto de SAT, peresperanta aparato, kies celo ĝuste estas ebligi la praktikan utiligadon de esperanto, povis tre facile solvi la demandon pri internacia ligilo inter la L.E.A. Homo kapabla levi 100-kilograman ŝarĝon, povas same bone levi 10 kilogramojn. SAT estante konstruita por interrilatigi la laboristajn esperantistojn el ĉiuj mondpartoj, povas ankaŭ tre facile servi al la L.E.A. por interŝanĝi siajn spertojn aŭ ĉe aliaj okazoj. Tiucele la per-esperanta aparato disponas spacon en sia semajna gazeto por ĉiuj gravaj novaĵoj kaj demandoj, havantaj intereson por la tuta laborista esperantistaro.

Kiu bone komprenis, ke la plej grava afero en la mondlingva movado estas la tuja aplikado de la lingvo; ke sekve ĉiuj laboristaj esperantistoj havas la devon aliĝi al SAT, tiu facile konsentos, ke la ekzisto de ĉi tiu lasta malnecesigas la starigon de esperanta internacio. La sperto cetere montris, ke ĉiu provo tiucela fiaskis. En ĉiuj - neoftaj - okazoj, kiam klopodoj ĉe internaciaj instancoj estas utilaj por la propagando de esperanto, tiam SAT povas bone plenumi la taskon kaj paroli je la nomo de ĉiuj laboristaj esperantistoj. Vere konsciaj mondlingvanoj ja estas nur tiuj, kiuj aliĝas al SAT kaj klopodas por pli kaj pli penetrigi la uzadon de la lingvo en la socian vivon. Kaj nur tiuj praktikuloj

povas havi aŭtoritaton por paroli je la nomo de la esperantista movado.

Aliparte, oni jam povas antaŭvidi la tempon, kiam la L.E.A. - almenaŭ en sia nuna formo - ne plu estos necesaj. Kiam esperanto estos vere grandskale uzata, ĝi sin propagandos mem per la aplikado. Tiam en ĉiu lingvo-regiono oni bezonos nur eldonkooperativon por liveri nacilingvajn lernilojn.

Cetere, kelkaj instruistoj opinias, ke oni povas tute bone lernigi la lingvon sen ia ajn nacilingva materialo. Pri tiu punkto mi ne havas firman opinion, ĉar tro malofte mi instruis la lingvon. Almenaŭ ne povas esti dubo, ke en la intereso de la lingvo-unueco estas dezirinde, ke oni utiligu kiom eble malplej da nacilingva instruilaro. Tion farante oni sin direktas al la fincelo laŭ la plej rekta vojo. Estas evidente, ke kiam esperanto estos fariĝinta la sola kulturlingvo en la mondo, tiam oni instruos ĝin en la lernejoj laŭ la sama maniero kiel oni faras nuntempe pri la nacilingvoj t.e. peresperanta instruado de esperanto. Tiam estos tute sencece paroli pri neceso de nacilingvaj lernolibroj.

El tiuj konsideroj oni estas nepre alkondukata konkludi, ke la rolo de la L.E.A. pli kaj pli tendencos malgraviĝi, ĝis ili fariĝos tute superflujaj.

Dume SAT restos ankoraŭ necesa por plenumi la taskojn, kiujn ni difinis al ĝi en la IV-a ĉapitro. Estonte kiel nuntempe la rolo de nia per-esperanta aparato restos la plej grava kaj zorginda.

VII

SAT kaj la oficialaj Institucioj de la Esperantistaro

Okaze de la Unua Universala Kongreso de Esperanto (Bulonjo-ĉe-Mar, France : Boulogne-sur-Mer, 1905) estis fondata Lingva Komitato (L.K.) kun la celo prikonsiliĝi kun D-ro Zamenhof kaj zorgi pri la konservado de la principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian

evoludon. La nombro de L.K.-anoj ne estas limigita. Nuntempe ili estas 110 el 24 diversaj diversaj landoj. La L.K. elektas mem siajn anojn. Rajtas prezenti kandidatojn la landaj asocioj esperantistaj kaj la fakaj societoj. La L.K. elektas inter si superan komisionon el 17 membroj, kiuj konsistigas la Akademio.

"La Lingva Komitato kaj ĝia Akademio ne havas la rajton iniciati iun ŝanĝon, korekton aŭ aldonon, nek krei novajn vortojn; ili devas nur konstati, kontroli, elekti, konsili, rekomendi aŭ malrekomendi: ili estas nur ordigiloj, moderigiloj kaj reguliloj, kiuj celas konservi la necesan unuecon kaj harmonion.

"La rolo de la Lingva Komitato kaj de la Akademio ne dependas de la plaĉo de iliaj anoj, nek de la okaza ŝanĝebla opinio de iuj esperantistaj grupoj aŭ kongresoj. Tiun rolon, tre klare kaj precize difinitan per la Fundamento, - kiu estas konstitucia leĝo por ĉiu esperantisto, - per la Fonda Regularo kaj per la Zamenhofaj komentoj kaj konsiloj, devas akcepti ĉiu Komitatano kaj Akademiano."

(El Deklaracio de la Akademio, decembro 1920)

Ni ne intencas esplori ĉi tie ĉu tiuj institucioj funkcias normale kaj kontentige; sufiĉas nun deklari, ke la principoj laŭ kiuj ili estis fondataj ŝajnas al ni ĝustaj kaj saĝaj.

Sed ekzistas aliaj t.n. oficialaj institucioj, pri kiuj estas necese diri kelkajn vortojn.

En la jaro 1922, ĉe Helsinki, okaze de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, estis farata kontrakto inter Universala Esperanto Asocio (U.E.A.) kaj la landaj asocioj. El tio rezultis organizo, kies strukturo estas jena: ĉe la bazo sidas la naciaj societoj unuflanke kaj UEA aliflanke. La naciaj societoj delegas po unu reprezentanto kaj tiel starigas Plena Estraro de la Esperanto-Movado (P.E.). Paralele al tiu P.E. staras la Komitato de U.E.A. Ambaŭ instancoj siavice elektas po tri membroj, kiuj konsistigas la ses-membran Internacian Centran Komitaton de la Esperanta Movado (I.C.K.).

Tiu I.C.K. pretendas reprezenti la tutan esperantistaron kaj paroli je ĝia nomo. Oni ne bezonas longe esplori la aferon por baldaŭ konvinkiĝi, ke la sinjoroj, kiuj starigis tiun aparaton, simple uzurpas rolon kaj trompas la neinformitan kaj kredeman publikon. Parolante je la nomo de la esperantistaro, la uzurpuloj ja sukcesas kelkfoje atingi, ke malavaremaj personoj donacas monon al ilia "oficiala institucio", kiu la kredo, ke ĝi fakte reprezentas la tutan esperantan movadon.

Ni diris, ke tiu I.C.K. uzurpas rolon kaj jen pravigado de nia diro : Jam en kelkaj landoj la laboristaj esperantaj asocioj havas pli da membroj ol la "naciaj oficialaj societoj". En Sovetio cetere Sovetrespublik-ara Unio Esperantista tute ne havas reprezentanton en P.E. Aliparte ne ĉiu esperantisto aliĝas al U.E.A. kaj se la progreso de SAT daŭras laŭ la ĝisnuna proporcio, nia organizo havos post du-tri jaroj pli da membroj ol la "oficiala" U.E.A.

Estas do tute klare, ke I.C.K. ne reprezentas la tutan esperantistaron, ĉar la laboristaj asocioj ne havas en ĝi reprezentantojn. Utilas ankaŭ menci, ke ne regas en tiu organizo konkordo kaj harmonio. En la okuloj de personoj bone informitaj, I.C.K. ne havas aŭtoritaton.

La laboristaj esperantistoj sekve agnoskas kiel oficialajn instituciojn nur la Lingvan Komitaton kaj ĝian Akademion. Estas unu el la taskoj de la organizita laborista esperantistaro klopodi, por ke, estonte, tiuj institucioj funkcii normale. Nuntempe tro da LK-anoj estas tiaj nur titolo, tro da ili estis elektataj pro konsideroj tute fremdaj al ilia lingva kompetenteco. Ĝis nun sole la t.n. neŭtraluloj okupiĝis pri la lingvaj institucioj de la esperanta movado. Necesas, ke la laboristaj esperantistoj - ne ĉiuj estas malkleraj kaj malsaĝaj - enblovu freŝan aeron en la ŝima atmosfero de la Lingva Komitato kaj Akademio; necesas, ke ili enfluigu novan sangon en tiuj malviglaj organismoj. (°)

(°) Noto de la reeld. : Pro la malapero de I.C.K. kaj de S.U.E. malaktualiĝis la ĉi-supra paragrafo.

La laborista esperantismo sin bazas sur la principo, ke la artefariteco kondiĉas la homan progreson; ĝi sin apogas sur la konvinko, ke la Laboristaro povos sin tute liberigi kaj starigi pacon en la mondo nur se ĝi firme organiziĝas laŭ tutmonda skalo kaj celas formi nedisigeblan unuon. Tia unuiĝo estas ebla nur per la helpo de komuna lingvo. Nia movado pravigas sian ekziston per la konstato, ke la laboristaj gvidantoj malatentas la tre gravan lingvan demandon kaj tiel senkonscie perfidas tiurilate la interesojn de l'Proletaro.

La laborista esperantismo ne ludos en la estonto malpli gravan rolon ol la kooperativismo kaj sportismo. La kooperativisto lernas la mastrumadon por povi anstataŭi la ĥaosan kapitalistan produktaj-distribucion; la sportisto lernas akiri korpan fortikecon kaj sanon; la esperantisto lernas plie akiri la intelektajn kaj moralajn ecojn necesajn por esti vera kaj inda mondĉivitano.

La Leganto bonvolu noti en la memoron tiujn niajn nerefuteblajn konkludojn. Per tio li certe konvinkiĝos pri la neceso pli kaj pli forte antaŭenpuŝi, plifirmigi kaj kapabligi la SAT-movadon.



Aliaj tekstoj pri SAT kaj la laborista esperantismo :

For la Neŭtralismon ! (Lanti)

Lanti pri Sennaciismo

Lanti pri Edukado (LJP-broŝuro)

El leteroj de Lanti (LJP-broŝuro)

Absolutismo (Lanti) (LJP-broŝuro)

Herezulo - Herezaĵo (Lanti) (LJP-broŝuro)

Manifesto de Sennaciistoj (Lanti)

Historio de SAT (1921 - 1952)

Mia vivo (N. Bartelmes) (LJP-broŝuro)

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut